

Sola la terkulturisto efektivas la homaron.
Ĉiuj aliaj estas aŭ servantoj aŭ parazitoj de la terkulturismo.
Leo TOLSTOJ

BAZARO

Esperantlingva revuo, Kluĵo, Rumanio

Jaro IV, Numero 4 (15)

2000, Vintro



ISSN 1453-7478

ABONO

La abono por la sekvanta numero de BAZARO por rumanianoj estas 5.000 leoj aŭ egalvaloro en poŝtmarkoj kaj por eksterlandanoj 1 IRK.

La abonon bonvolu sendi al jenaj adresoj:

C.P.1111. RO-3400 CLUJ-NAPOCA aŭ

C.P.200. RO-3400 CLUJ-NAPOCA por 'SIGMOND Júlia

Ni akceptos donacojn, subtenojn kaj varbas distribuantojn por nia gazeto! Dankon, La red.

Pruntlibraro de BAZARO

Ni posedas pli ol 300 librojn, dank' al donacintoj. Ĉiuj geesperantistoj el Rumanio havas eblecon prunti el la libroj SENPAGE! La petitan libron ni sendos per rembursado. Ni petas maksimume dum tri monatoj ellegi la pruntitan libron. Pro la perdita libro oni devas pagi 20.000 leojn.

Al la interesiĝantoj ni sendas la liston de la titoloj. La red.

Se vi deziras korespondi esperante, trovi geamikojn tra la mondo, skribu al:

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

B.P.6, F-55000 Longeville-en-Barrois, Francio

La redakcio ne respondecas pro la artikoloj skribitaj de niaj kunlaborantoj, kaj ili ne nepre reflektas la opinion de la redakcio. Ni ne resendas la manuskriptojn, nur se vi nepre petas tion!

Oni rajtas aperigi artikolojn el BAZARO, sub la kondiĉo, ke oni aperigu ankaŭ la fonton.

BAZARO

Esperantlingva revuo

Redakcio:

ASOCIO de ESPERANTO CLUJ
RO-3400 Cluj-Napoca, C.P. 1111
RUMANIO

Eldonas:

MUNICIPA KULTURDOMO
Piata Unirii n-ro 24, Kluĵo,
RUMANIO

Redakcia komitato:

'SIGMOND Júlia, Liviu BARDI

BAZARO

Revistă în limba esperanto

Redactia:

ASOCIATIA de ESPERANTO
CLUJ
RO-3400 Cluj-Napoca, C.P. 1111
ROMÂNIA

Editată de:

CASA MUNICIPALĂ DE
CULTURĂ
Piata Unirii nr.24, Cluj-Napoca,
ROMÂNIA

Comisia de redactie:

'SIGMOND Júlia, Liviu BARDI

Aperas: kvaronjare

Apare: trimestrial

DECEMBRAJ REMEMOROJ

Decembras kaj la alproksimiĝanta Zamenhof-Tago igis min rememori decembron antaŭ 17 jaroj. Estis 1993, kaj Esperanto kaj la agado ĉirkaŭ ĝi „ĝuis” specialan atenton ĉe diversaj instancoj en Rumanio, precipe ĉe certa polico. Ĉirkaŭ la mondo oni festis la „Internacian Jaron de Komunikado” dum en Rumanio komunikado fariĝis pli kaj pli malfacila kaj informado estis neniel pli bona. Mi decidis uzi eblecon de tiu speciala jaro por informi eventualajn interesatojn pri tiu lingvo, kiun mi estis eklerninta antaŭ malpli ol kvar jaroj, kaj kiu montriĝis tiom utila al mia informiĝo. Mi do enketis ĉe la direktoro de la Distrikta Biblioteko Kluĵo pri la ebleco organizi en ties montrofenestroj ekspozicion pri Esperanto.

La tre afabla tiama direktoro akceptis mian sugeston kaj ni decidis ankaŭ pri la periodo de la ekspozicio: decembro. Tiumonate oni festas la naskiĝtagon de la iniciatinto de Esperanto kaj ankaŭ la tagon de la Esperanta libro. Mi ricevis la ŝlosilojn de la montrofenestroj kaj, helpe de kelkaj lokaj samlingvanoj kiuj pruntedonis materialojn por la ekspozicio, mi starigis ĝin en la montrofenestroj rande de la biblioteka koridoro. Amiko mia, studento ĉe la kluĵa belarta instituto, kreis afiŝon dulingvan (rumana-Esperantan), kiun ni alfiksis sur la flankon de la unua montrofenestro. Ĉio estis preta por bonvenigi la gapantojn: libroj, periodaĵoj, afiŝoj, turismaj reklamiloj - ĉio kun dulingvaj etiketoj. Komenco bona...

Dum kelkaj tagoj mi forestis el la urbo vizitante miajn gepatrojn en vilaĝo. Mi revenis kaj la unua vizito kiun mi faris estis ĉe la Esperanta ekspozicio. Konsternite mi rimarkis ke la afiŝo malaperis kaj tuj enketis ĉe la deĵoranta bibliotekistino pri la kialo. Feliĉa ke ŝi revidas min, ŝi tuj anoncis la direktoron, kiu senprokraste aperis por peti la ŝlosilojn de la montrofenestroj.

Evidentiĝis ke la vorto Esperanto ne eskapis al la atentemaj instancoj, kiuj interesiĝis pri la oficialeco de la ekspozicio, pri ĝiaj aprobinto kaj organizinto. La malfeliĉa direktoro povis nur aŭskulti la demandan atakon kaj informis la sturmintajn scivolulojn pri la sola persono kun kiu li estis en kontakto rilate la malbenitan ekspozicion: mi. Certa sinjoro ĉe la distrikta kultura departemento aparte interesiĝis pri mi kaj insistis paroli kun mi.

En sia oficejo, kie li akceptis min kun tiu supereco tipa al la tiamaj gravuloj, li montris al mi la malaperintan afiŝon, kiu estas pruvo

pri „kontraŭleĝa propagando”, ĉar laŭ lia moŝto „neniu aprobis tian ekspozicion”, pro kiu la direktoro de la biblioteko povus perdi sian laborlokon kaj mi povus arestiĝi, precipe se mi rifuzas... kunlabori.

Kunlabori - jen la refreno, kiun mi aŭdis milfoje el la buŝoj de tiuj kiuj okupiĝis pri nia „sekureco”. En tiu ĉi kazo, kunlabori signifis informi la demandanton pri la fonto de tiuj esperantaĵoj kiuj ne estis eldonitaj en Rumanio, pri la korespondrilatoj kun eksterlandanoj, pri la aŭtoroj de fiaj artikoloj pri Rumanio aperintaj en Esperantaj periodaĵoj kaj, precipe, pri la membraro de la kluĵa E-klubo. Kompreneble, kiel ties sekretario mi devus koni detalojn pri la koncerna grupo „aganta kontraŭleĝe ĉar ĉia E-agado en Rumanio estas malpermesata”. Interesaj ŝajnis por mia intervjuanto precipe tiuj membroj kiuj ne apartenas al la rumana etno: ĉu ili mem abonas eksterlandajn periodaĵojn, ĉu ili akceptas fremdajn gastojn, ĉu ili korespondas kun eksterlandanoj? Ĉiuj ŝajnis al mi tro personaj demandoj por havi respondon al ili. Mi do klarigis ke mi ne povas respondi. Tio estas manko de kunlaboro, ĉu ne?

Tamen restis unu ŝanco: se mi, kiel sekretario, forigus ĉiujn nerumanojn el la klubo, ĝi povus daŭre agi. Se ne, la agado de la klubo estos malpermesita kaj mi estos punita. Ne, ne pro la klubo, sed pro la ekspozicio. Forigi miajn amikojn? Tio neniam eblus. Diskriminacio ne estus unu el aferoj, kiujn mi akceptus. Mi preferis do rezigni pri ĉia E-agado en la klubo kaj konservi amikojn. La tempoj ŝanĝiĝos.

Ili ja ŝanĝiĝis, kaj tiuj amikoj, kiujn mi devintus forigi el mia rondo, restas, post 17 jaroj, amikoj. Jen kaj jen ni interŝanĝas leterojn, foje ni renkontiĝas; la rilatoj inter ni restas amikaj. Pri ili mi scias multon. Mi tamen ne scias, kio okazis al la iama „kultura aganto”. Ĉu li daŭre estas kamuflita en civilaj vestoj aŭ ĉu li finfine surmetis la uniformon de la retrograda organizo por kiu li aparente laboris?

Ionel ONET, USONO

OPINIESPLORO

Dum kvar jaroj aperis 15 numeroj de BAZARO. Ni dezirus koni vian opinion pri ĝia enhavo. Pro tio ni petas ĉiujn legantojn, bonvolu skribi al ni, kiuj (3) tri artikoloj plaĉis al vi pleje kaj se aperis io tute ne ŝatata de vi. Antaŭdankon!

La red.

REKOMENDITA REGULARO DE LA MONDA ORGANIZO DE SANO RILATE AL NUTRIĜADHIGIENO

La bulteno de la Monda Organizo de Sano (MOS), „O.M.S. Information” publikigis la oran regularon por la higiena pretigo de la nutraĵoj, kiu celas preventi la malsanojn kaŭzitajn pro la konsumado de malhigienaj nutraĵoj. Tiuj malsanoj estas la plej disvastiĝitaj ĉie en la mondo kaj la prevento estas grava higiena problemo.

Jen la regularo:

- Elekti la nutraĵon por kiuj bezonas preventaj procedoj antaŭ de konsumado. La fruktojn kaj legomojn ni devas konsumi freŝe, sed la konsumado de la senboligita lakto estas danĝera. La konservadaj procedoj plilongigas la daŭron de konsumado. Lavu zorge la fruktojn kaj legomojn antaŭe de kruda konsumado!
- La zorga pretigo de la nutraĵoj. Multnombraj krudaj nutraĵoj estas kontaminataj pere de patogenaj mikroorganismoj. La zorga preparo neniigas la patogenajn ĝermojn se la nutraĵojn oni kuiras uzante plej minimume +70 o C. varmegan temperaturon. Se la koloro de la viando apud la ostoj estas ankoraŭ ruĝeta, nepre kuiri pli perfekte. La viandon oni devas kuiri nur senfrostigite!
- Konsumadu la nutraĵojn tuj post la kuiri! Poste de malvarmiĝo en la nutraĵoj plimultiĝas la mikroorganismoj, sekve konsumadu tiujn tuj poste de la pretigo.
- Konservu zorge la kuiritajn nutraĵojn! Se la nutraĵojn oni ne konsumas tuj post de la kuiri, konservu tiujn uzante plej minimume +60 oC. varman temperaturon aŭ plej minimume -10 o C. malaltan temperaturon. Enmeti la varmegan nutraĵon en la fridujon estas malpermesita, ĉar en tiu kazo la nutraĵoj malvarmiĝas nur malrapide, sekve tiu procedo preferas por la plimultiĝo de la patogenaj mikroorganismoj.
- La ĝusta revarmigo de la kuiritaj nutraĵoj. Tiun procedon faru uzante plej minimume + 70 o C. varman temperaturon neniigi la patogenajn mikroorganismojn, kiuj jam plimultiĝis en la konservita nutraĵo post la pretigo.
- Evitu la kontakton inter la kuiritaj kaj krudaj nutraĵoj! Kvankam la pretigo de la nutraĵoj estis ĝusta, la krudaj nutraĵoj povas kontamini la kuiritajn, ekzemple okaze de tranĉo de la kruda viando, la tranĉilo povas kontamini la kuiritajn nutraĵojn, se ni tranĉas tiujn per la sama nelavita tranĉilo.

– Gardu ke la kuirejo estu ĉiam pureca, kiam vi pretigas la nutraĵojn! La kuiraj iloj: viŝtukoj, tablotukoj, vazoj, teleroj, tranĉiloj, kuleroj ktp. estu ĉiam puraj, lavu tiujn ofte laŭ bezono.

– Gardu la nutraĵojn de kontakto kun ronguloj, insektoj kaj aliaj bestoj, kiuj povas kontamini la nutraĵojn! La plej ĝusta procedo estas konservi la nutraĵojn en hermetike fermitaj vazoj.

– Uzadu nur trinkeblan, higienan akvon okaze de pretigo de la nutraĵoj! Se ni ne havas higienan, trinkeblan akvon, nepre oni devas boligi la akvon antaŭ de uzado. Faru saman okaze de pretigo de la glacikuboj en la fridujo!

Okaze de edukado pri la sana vivmaniero nepre atentigu ĉiujn respekti la menciitajn rekomendojn de la Monda Organizo de Sano preventi la malsanojn, kiujn disvastigas la malhigienaj nutraĵoj.

Esperantigis D-ro LÁZÁR Gábor, COVASNA

RAPORTO DE LA VOJAĜO DE KRIZANTEMO EN RUMANIO

Mi vojaĝis interese dank' al la organizado de s-ino 'SIGMOND Julia, hungaro, emerita pupaktoro, aktiva esperantisto, mia amiko jam de pli ol 15 jaroj.

En Rumanio, ĉefe en la regiono Transilvanio, loĝas ĉ. 2.000.000 hungaroj kiel minoritato (ĉ.9% de la loĝantaro). En transilvaniaj urboj plejparto de esperantistoj estas hungaroj spite de la klopodoj inviti rumanojn en Esperantion kaj kvankam rumanlingvanaj esperantistoj mem diras: Por ruman-lingvanoj lerni Esperanton estas kvazaŭ ludi. (La rumana lingvo estas latinida, sed ne slava.) Povas esti ke hungaroj, vivante du-lingve, havas emon kontakti eksteran mondon kaj ricevi pli da stimulon por pozitive kulturumi. En grandaj urboj de Transilvanio aktivas hungarlingvaj lernejoj, teatroj kaj aliaj kulturaj agadoj, paralele kun tiuj rumanlingvaj.

Kiam oni konsideras la ekonomian staton de Rumanio, estas mirinde ke ĉ. 15 partoprenis en UK en TEL-AVIV. Nun multaj jam parolas pri UK 2001 en ZAGREB kiel UK en „nia mondoparto” atingebla trajne, buse aŭ aŭte.

BUCUREȘTI (esperante:BUKAREȘTO/loĝas ĉ 2.330.000/aŭgusto 02-04)

S-ino Magdalena PREDESCU gastigis, gvidis min tra la urbo, eĉ al la subĉiela muzeo pri farmdomoj de diversaj regionoj, kaj kuiris rumane, ekzemple "sarmale (farĉitaj brasikoj)" kaj „polenta (maizkaĉo kun fromaĝkremo)". S-ro Marian CONSTANTINESCU transportis min per sia aŭto tra la urbo kaj al stacidomo por eviti la kostegon de taksio. Aliajn esperantistojn mi ne renkontis.

Mi impresiĝis, ke la urbo estas seka kaj malorda, kvankam ĝi havas multajn lagojn kaj arbarajn parkojn. Ankaŭ ĉe homoj irantaj mi ne vidis metropolan viklecon.

BRAȘOV (esperante: BRAȘOVO/loĝas ĉ. 320.000/ aŭgusto 04-06.)

Je la fino de 3-hora veturo la trajno transiris la montaron. Post la lasta tunelo min atendis vigla verdo en taŭge malseka aero. Jen la regiono Transilvanio!

Mia celo halti en BRAȘOVO estis reguligi kontakton inter esperantistoj de la urboj BRAȘOVO kaj MUSASINO (loĝas ĉ.130.000), ene de TOKIO. Inter tiuj du urboj ekzistas kunlabora rilato (malpli forta rilato ol ĝemelaj urboj) ekde la tempo de la ekonomimalfacilego de Rumanio post la 1989-a revolucio.

Kun s-ro Ion SĂRBU la urbon trapromenis kun halto ĉe lia hejmo, kie atendis s-ino Lucica. Mi gastis ĉe ges-roj Constantin kaj Mihaela MARCU. La familio per sia aŭto portis min tra la ĉirkaŭo de la urbo kaj ankaŭ al pikniko en arbaro. Kompreneble ne mankis la vizito al la kastelo Bran, fonto de la fikciaĵo „Drakulo", nepraĵo de la turismo en BRAȘOVO. Mi ne renkontis aliajn esperantistojn.

CLUJ-NAPOCA (esperante: KLUĴO/ loĝas ĉ.330.000/ aŭgusto 06-10)

Je la alveno al la hejmo de s-ino 'SIGMOND Julia, mi salutis: „Pardonon! Mi ne sukcesis porti vian diplomon." „???" „La diplomon de la unua premio de la branĉo de prozo de la Belartaj Konkursoj de la UK en TEL-AVIV." „!!!" Jam estis noktomeze, sed ŝi ne povis deteni sin de emo telefoni al sia frato kaj al siaj amikoj.

Kun ŝi travagis la urbon belan kaj interesan, per taksio ekskursis al la kanjoneto proksime de la urbeto TURDA, 30 km-jn suda.

En la Esperanto-societo de Cluj kunsidis 11: Pali, Claudiu, Sándor, Dodo (karesnome), Mariko (ne temas pri la japana nomo „Mariko"), Monika, Speranta (el Turda), Zsuzsa, Csaba, Julia. La nomo „Speranta (prononcu: Speranca)" brilas pro rumaneco.

ORADEA (loĝas ĉ. 220.000/ aŭgusto 10-13)

Mi gastis ĉe s-ro FAZAKAS Alexa kaj la edzino JUHÁSZ Idisz. Akompanis min ĉiam grupo da esperantistoj per la aŭto de komencantino Zita por travagi la belan urbocentron, ekskursi al la stalaktita groto „Peștera Urșilor (groto de urso)”, 86 km-jn sudorienta, pikniki en arbaro de la varmfontejo Băile Felix, 10 km -jn suda. Por la groto, samkiel en aliaj turismaj lokoj, enirbileto por eksterlandano kostis pli ol por rumano, kiel postlasitaĵo de la socialisma tempo.

En la kunsido de la urba Esperanto-societo ĉeestis 16 el diversaj generacioj, inkluzive de knabo: Alexa, Idisz, Irene, Valeria, Zita, Kati, Attila... Ankaŭ ĉi tie plejmulto estas hungaroj.

TIMIȘOARA (esperante: TIMIȘOARO/loĝas ĉ. 330.000) aŭgusto 13-16)

Pro manko de taga trajno la gastiganto, s-ino Maria SECULA, devis atendi min en la stacidomo noktomeze. Sekvantan tagon ŝia amikino akompanis nin en sian laboron: foti vilaĝojn kaj turismajn lokojn de la regiono. Ni veturis per la aŭto de fotisto. Se ne estus tia ŝanco, mi eble ne vizitis vilaĝojn ordinarajn.

Planite estis veturi al BEOGRAD sekvantan frumatenton, sed tion mi unu tagon prokrastis, ĉar respondis neniu ĉe la telefono de la planita gastiganto. Anstataŭe sekvantan tagon ni renkontis s-inon Floarea POPA, aktivulon de la urba Esperanto-grupo, kaj vespere s-inon Aurora BUTE, jam konatiĝintan en UK.

Dankon al ĉiuj, kiujn mi renkontis dum la vojaĝo!

KRIZANTEMO, JAPANIO

Ni dankas al niaj subtenantoj, kiuj laŭ siaj eblecoj helpis nin:

Gigi HARABAGIU, USONO, 100 USD

G.DONÁTH Blanka, HUNGARIO, 2000 HUF

NAGY Kornélia, HUNGARIO, 2000 HUF

Constantin DOMINTE, BUKAREȘTO, 50.000 leoj

Okaze de la 75-a naskiĝtago de prof. d-ro I.F. BOCIORT, multaj geesperantistoj el Rumanio deziras al li bonan sanon, ankoraŭ multajn sukcesplenajn rezultojn en sia por esperanta vivo kaj laboro. Pro mankospaco, bedaŭrinde, ni ne povas aperigi ĉies bondezirajn tekstojn.

La red.

MISPAŜO KONTRAŬ LA ETIKO DE ĴURNALISMO

Fantaziaĵoj pri la homoj damaĝas la prestiĝon de niaj revuoj.

Ni ne misuzu la junecon de nia BAZARO per riproĉendaj materialoj kaj tro hastaj konsiloj. Oni ne forgesu ke gazeto ne estas simpla kolekto de artikoloj, ĉu seriozaj, ĉu konfuzigaj aŭ strangulaj, ĉar, sciante, ĝi devas plenumi informan, kulturan, organizan, mobilizan kaj hedonisman (ĝojigan) funkciojn. Ni ĝuste komprenu la „senresponsecon pri la opinioj”, ĉar ĝi ne senlimas: neniu demokratia kaj matura revuo akceptas hodiaŭ artikolojn de naciistoj, ŝovinistoj, rasistoj aŭ senbazajn blamaĵojn de laboro aŭ personeco de la homoj. Al tio aldoniĝas en la E-revuo la observado de la spirito de Esperanto.

Iam mi postulis de UEA (prezidentis G.Maertens), ke la E-gazetaro ne aperigu polemikojn, ĉar iuj „samideanoj” jam procesas pro kalumnio. En Berlino oni respondis al mi: „Ĉu ni devas katri la movadon? Polemiko necesas ĉie, kiel ĝustigo de principoj, en scienco, kulturo, politiko, religio... Sed oni ne identigu ĝin al vanteco de iuj needukitaj homoj aŭ kverelaĉaj karakteroj. Tiaj homoj generas konfliktojn neeviteblajn.” Poste mi rimarkis ke iuj esperantistoj, nekapablaj verki ion validan, al kutimiĝis blami ĉion en Esperantujo: La Manifeston de Prago, la figurojn de Kalocsay, Waringhien, Lapenna, Auld kaj fine tiun de Zamenhof mem, sen mencii la mispaŝojn kontraŭ niaj simplaj kaj agemaj samideanoj. Al tiu fia fenomeno mi respondis en mia eseo La spirito de Esperanto kaj la „samideanaj” malamikaĵoj. (Tria Premio en Belartaj Konkursoj de UEA, 1998). Mi kritikis similan fenomenon se en BAZARO iu ajn falintus en la „muelilon”. Ĉu mi rajtas silenti se nia konata scienca kolektivo, kaj mem mia sensignifa persono, spertas tion? (Vd. la artikolon de Ion Sarbu (IS) en BAZARO 2/2000). Mi ĉiam instigis la esperantistojn skribi siajn memoraĵojn, necesaj por nia historio. Sed IS skribis pri NIA laboro, kiun li konas videble samkiel la E-agadon en Nepalo aŭ Tanzanio. Por li, niaj fortostreĉoj kaj atingajoj estis „tempoperdo”. Mi devas nun ripeti kelkajn niajn rezultojn, por ke la legantoj prijuĝu: Sub diktaturo malpermesanta eĉ la vorton „Esperanto” en enlandaj publikaĵoj, inter 1970 - 89, dekmiloj da gestudentoj kaj lernantoj, eble centmiloj da homoj, ekde laboristoj ĝis akademianoj, ministroj, ĉefredaktoroj k.s. eksciis la VERON pri Eo. Oni ŝanĝis la opiniojn pri ĝi en universitataj kursoj, senatoj, estigis

akademian kolektivon pri Eo, enkondukis la lingvon en filologiajn fakultatojn, en la Tutlandan Asocion de Filologoj, en sciencajn sesiojn kaj revuojn (kiel resumojn), aperigis plurajn lernolibrojn, vortarojn kun oficiala aprobo, oni preparis en la kvar universitatoj ĉ. 300 potencialajn E-instruistojn, permesis tutlandajn renkontiĝojn (en Timisoara) ktp. „Tempoperdo”, ĉu ne? Kiuj aliaj strategioj alportis similajn atingaĵojn? Gravas ne la opinio de IS pri scienca kolektivo, gravas la fakto ke, helpe de BAZARO, li dissendas en la mondon bagateligon de ĝuste hodiaŭ ege necesaj agadprincipoj. Nu, se la leganto permesas, gravas iom por mi (tio povus okazi al ĉiu ajn), la fakto ke IS, samkiel okaze de mia 70-jariĝo, ankaŭ nun, ĉe mia 75-jariĝo „gratulas” min per sendignaj falsajoj kaj fine per kalumnio. Ĉio en la nomo de „vero”! Ni do vidu kion signifas „vero” por li! Ĉu ĝi estas senresponseco de maljunulo aŭ nur misago de kverelanta homo? Mi brakumadis lin ĉe renkontiĝoj, sincere laŭdis lian longjaran agadon, pro kiu li dignas je danko kaj honoro (samkiel multaj aliaj). En mia ĵus aperinta verko en USONO (per afableco de Ionel ONET), mi nomis s-ron IS „laŭaĝa dekano de nia E-movado”. Tiuj ĉi vortoj validas. Li vivu longe, sane en digno kaj honoro pro lia poresperanta agado. Tamen, en sia aspiro al ofendoj IS distordas klarajn asertojn kaj nehavante argumentojn por blamaĵoj, li inventas ilin kaj poste polemikas kontraŭ siaj propraj ĥimeroj. Tio estas vera tempoperdo por ĉiuj kaj mispaŝo kontraŭ la etiko de ĵurnalismo.

Por IS, komence de 70-aj jaroj mi „nenion sciis pri Eo, eble nek parolis ĝin”! Jen opinio de homo nekonscia pri la postuloj de scienca engaĝiĝo: kuŝ gvidaj funkcioj en universitato kaj en kulturaj revuoj aŭ instancoj mi propagandis en sciencaj rondoj kaj proponis al oficialaj instancoj ideon al mi nekonatan!! Dum mia agado en la Berlina Universitato (1965-70), mi ofte partoprenis E-aranĝojn, funde studis la problemaron de Eo per plurlingva bibliografio, faris E-lingvan ekzamenon en la Kulturligo (mia „Diplomo” videblis en la ekspozicioj de Timișoara). Mi vizitis Braŝovon ne laŭ instigo de eksterlandano, kvazaŭ Braŝovo estintus aparte grava E-centro; mi vizitis pli ol dek urbojn kaj urbetojn (iujn 2-3-foje, sen mencii Bukareŝton), ĉar mi volis konatiĝi kun la esperantistoj, kuraĝigi kaj informi ilin pri gravaj sciencaj iniciatoj, montri al ili nian respekton kaj samtempe mi volis paroli pri Eo en universitatoj, lernejoj, kulturdomoj. Per niaj samideanoj mi ankaŭ eksciis pri la gravuloj pretaj helpi al ni. En Bukareŝto mi eksciis pri MOISIL, ARGHEZI,

ASLAN, BOGZA, IVAȘCU k.a., sed IS neniam informis min pri akad. R.RĂDULET, tial, leginte pri tiu en antaŭa artikolo de IS, mi scivoleme demandis pri tiu evento. Mi povintus demandi la akademianon mem en Timisoara, sed mi nenion estis sciinta pri lia favora sinteno al Eo. Nu, en mia simpla demando „kion diris Radulet en 1957”, IS vidis „sarkasmon” kaj (bv.noti!) „vulgaran sintenon”, „ofendon al memoro de pioniro”. Dankon, Ion SĂRBU! Dankon, BAZARO, por tiu insulto! Laŭ IS mi kulpas pro „malfruiĝo” en demeto de dosiero por oficialigi la asocion post 1989! Fakte ni tro rapidigis la aferon! Niaj Bukareŝtaj kunlaborantoj jam la 23-an de januaro pretigis la dosieron, sed poste vidiĝis ke ĝi ne estis kompleta, ke, post 2-3 jaroj, la E-Asocio NE EKZISTAS, kaj Aurora BUTE devis fari ĉion de komence por vere krei la asocion. Entute, kial mi persone devintus vojaĝi por eble la 20-an fojon al Bukareŝto por nia afero, sub liberaj kondiĉoj, por simpla formalajo?

Tamen la plej nepardonebla kalumnio estas la fakto ke IS atribuas al mi la aserton aŭ pretendon esti „la persono kiu enkondukis E-on en Rumanion”!! Kiu teksto povis soni tiom absurde en lia fantazio?? En pluraj miaj laboraĵoj, artikoloj, paroladoj mi substrekis la meritojn de la iamaj esperantistoj, kiuj faris „ke la flameto de Eo ne estingiĝu en Rumanio”. Neniu normala nuntempo povas aserti tian absurdajon, sed IS vidas ĝin reala, kaj polemikas kontraŭ sia fantaziaĵo. Mi strebis enkonduki E-n en la menson de niatempaj gravuloj, kaj de simplaj homoj, konfuzitaj dum jardekoj per lingvistoj kaj dogmatikuloj. Neniame mi ignoris ke antaŭ ĉirkaŭ 60-70 jaroj ekzistis E-agado en nia lando, sed IS „grandanima” volas instrui min pri io! Entute mi NENIAM skribis vortojn kiajn: „Mi estas la persono, kiu havas tiun aŭ tiun meriton”!

Mi miregis pri la nekompreneblaj malamikaj intencoj de I.Sarbu, mi bedaŭras ke la agado de nia iama kolektivo kaj mi mem trovis ĉe li tiom malmulte da respekto. Restas nur la espero, ke en tiu ĉi diskuto troviĝas io lernebla, nome, ne pensi supraĵe, ne agi laŭ hazardo aŭ daŭre atendi „bonŝancojn” kaj precipe ne diskuti senrespekte, kvazaŭ malamike pri la laboro kaj atingajoj de la aliaj. Por esperantistoj sola rekompenco pro la pasiaj streboj (cele de raciigo el certa vidpunkto la nunan komunikadon) estas la reciproka respekto. Se tio mankas, ĉio mankas.

I.F.BOCIORT, GERMANIO

KIAM MI ESTIS LA PLEJ FELIĈA EN MIA VIVO?

Mi ne povas paroli pri unu plej feliĉa momento en mia vivo, kiu nete elstaras inter aliaj feliĉaj momentoj. Kiam mi pensas pri momentoj de granda feliĉo, mi rimarkas ke temas pri tiaj momentoj, kiam tempo kaj ĉirkaŭaĵo svagiĝas. Ekĝuo de por mi belega muziko, enamiĝo (kaj precipe la unua), sperto de varma amikeco, malkovro de nova pejzaĝo, malkovro de nova povo, legado de libro kiu malfermas por mi nekonatan mondon... tiom forte povas absorbi mian atenton kaj havigi intensan ĝuon ke miaj emocioj obtuzigas perceptadon de aliaj impresoj. Minutoj fariĝas kvazaŭ eternaj aŭ horoj forflugas; mi ne plu sentas malkomforton pro troaj varmo aŭ malvarmo, aĉa ĉirkaŭaĵo foje fariĝas idilia...

Kiam mi estis knabo aŭ juna viro, la plej intensaj ĝuoj subite kaj neatendite „falas” sur min. Kun la kreskanta aĝo, mi malpli ofte spertas eŭforiajn travivaĵojn. Nuntempe mi pli kaj pli sentas kontenton kaj bonfarton kiam mi ekhavas la impreson ke mi kreskas: kiam mi realigas ion, kion mi antaŭe ankoraŭ ne sukcesis aŭ kiam mi malkovras ion novan ĉe mi aŭ ĉe kunuloj. La ĝuo pro tia malkovro estas malpli intensa sed pli longedaŭra. Juna, mi foje intense ĝojis pro la konduto de homo en mia ĉirkaŭaĵo, sed mi ankaŭ ofte sentis ĉagrenon. Nuntempe, mi sentas pli kaj pli da ĝuo kiam mi sukcesas akcepti faceton pri mi mem aŭ pri mia amiko, kiu antaŭe ĉagrenis min.

Mi volas speciale mencii unu fenomenon. Kiam mi komencis kunlabori en Movado sen Nomo, mi kredis je la mesaĝoj eldonitaj sed dubetis ĉu la esperantistoj bezonas ilin. En la daŭro de la jaroj ni ricevadis leterojn de homoj, kiuj esprimas sian profundan admiron kaj dankon pro la levilkartoj. En tiaj leteroj, mi ofte trovas novan enhavon, novan vidpunkton, pri kiuj la aŭtoroj de la kartoj kaj mi ne jam pensis. Plurfoje tiuj reagoj emocie tuŝis min. Tia sento povas akompani min dum pluraj tagoj. Mi sentas dankemon al la reaginto!

Ivo DURWAEL, Movado sen Nomo

Karaj, feliĉa – jes; jes, ankaŭ feliĉa mi estis, kiam konsentis mia patrino, esti iam akceptota en maljunula hejmo. Iam post ŝia 90 jara naskiĝtago.

Tiun festotagon mem ŝi travivis sufiĉe malsana. Kelkajn semajnojn poste ŝi unuafoje jesis mian jenan klarigon:

Enloĝinta en hejmo kiel sana, moviĝebla, feliĉa, aktiva persono, oni mem povas trarigardi, trapaŝi la domon, ĝies ĉambrojn,

kelon, ĝardenon, kuirejon, lavejon, ĉiujn koridorojn, oficejojn; oni povas viziti la hejman bibliotekon; vigla, oni ĝoje renkontas la aliajn, kune povas promenadi, ludi, kanti, gimnastiki, viziti teatron, oni eĉ povas helpi al la servist/in/oj, helpant/in/oj; oni povas viziti en aliaj ĉambroj aliajn, kiuj ne plu povas forlasi ilin; ebla kuri, oni povas vidi, inspekti la ĉirkaŭaĵon, la vendejojn, la pejzaĵon, jes, kaj vere ankaŭ gravas la tombejo. Sana kaj feliĉa kaj vigla oni plej memkompreneble estas „la sino B.”

Alie, se oni daŭrigas rifuzi akcepton sed iun tagon devige „devas”, verŝajne tiam en malbona sanstato, eble jam handikapita iel ajn aŭ nur ebla, kuŝi en la lito, tiam oni eble - espereble nur komence - estas „la nova en la ĉambro 24”. Tiam oni ne havas eblecon alkutimiĝi al la hejmo mem, al ĝia etoso, al la ĉirkaŭaĵo, al la vendejoj, el kiuj - ĉu? - aliaj aĉetos bonaĵojn por si. Ne plu kapabla, propravole kontakti la najbarojn, oni verŝajne ne estos vizitata, ĉar ne (bone) konata; tiam, neniuj venos por prezenti „mian nepon, pri kiu mi jam multe rakontis al vi”; pli-mapli handikapita, oni ne povas oferti helpon al aliaj, la sociala kontakto plejparte nomiĝas „preni, akcepti, pacienci”.

Kiam dum la lastaj semajnoj mi telefonis al mia patrino, ŝi vigle parolas klare kaj feliĉe, kaj rakontas pri ĉiu kaj ĉio, kun kiu ŝi faras kion. Tro mallongaj aperas al ŝi la tagoj. Feliĉa en la hejmo ŝi estas, same kiel mi.

Feliĉa mi - jes, pro ŝi kaj pro mi mem, sed kompreneble kaj permesite mi ankaŭ sentas min malŝarĝita.

Malŝarĝiĝo - feliĉiĝo.

MARGARETE

SPECIALA DANKO

Elkore ni dankas la grandaniman donacon de nia amiko el Braŝovo VAJDA Ioan, kiu sendis al ni librojn, gazetojn, gramofondiskojn, poŝtmarkojn, E-insignojn kaj aliajn esperantajojn por doni financan helpon al BAZARO!

La red.

KORESPONDI DEZIRAS

Retpoŝte deziras korespondi kun esperantistoj el Rumanio
Jean-Loup GAUDIN, 62, rue de Meyrin, FR-01210 FERNEY-VOLTAIRE, tel.(0)450428529. FRANCIOe-mail JL.GAUDIN
(x)wanadoo.fr

ESPERANTO RAPORTO

Ni salutas vin.

En ĉi tiu lernoĵaro 2000-2001, kun la helpo de nia kunordiganta lernejestrino Domnica PETROVICI, Grănicești, distrikto Suceava, ni komencis fakultative instrui la Internacian Lingvon Esperanto en du lernejoj, po unu horo semajne.

– en la lernejo SLOBOZIA, oni simultane instruas E-lingvon por du klasoj (en la oka klaso por 6 gelemantoj kaj en la sepa klaso por 15 gelemantoj)

– en la lernejo ROMĂNEȘTI, oni instruas E-lingvon en la sepa klaso por 11 gelemantoj.

La E-didaktikaj materialoj estas E-lernolibro (Sf. GHEORGHE, 1995) de prof. Mihai TRIFOI por ĉiuj gelemantoj kaj por la profesoro E-lernolibro (TIMIȘOARA, 1990) de prof.univ. dr. Ignat Florian BOCIORT.

Ni atendas viajn konsilojn por havi sukceson!

Ionel BODALE, E-profesoro
SC. GEN. ROMĂNEȘTI
Cod. 5866 jud. SUCEAVA

LETERO AL BAZARO

Kun granda ĝojo mi malfermis la lastan numeron de BAZARO en la bela verda vesto. Kiel kutime la enhavo estis tre interesa. Aparte mi aprezis la tradukojn el la rumanaj verkoj.

Se eblas, mi ŝatus ricevi la jenajn prelegojn: 1. „Danuba ponto de Cernavodă”, 2. „La naturo ĉirkaŭ la FERPORDEGO” kaj 3. „Literatura vojaĝo laŭlonge de la Danubo”.

Samtempe mi tre petas vin fari al mi grandan servon. Mi ŝuldas respondon al tiom da esperantistoj kaj mi esperas ke vi povos trovi spacon en BAZARO por la apuda MALFERMITA LETERO al la Rumanaj Esperantistoj. Tiel maniere mi povas oficiale konigi pri la manuskripto ESPERANTO EN RUMANIO.

Kun sinceraj dankoj kaj amikaj salutoj al ĉiuj, kiuj laboras por BAZARO.

Gigi HARABAGIU, USONO

MALFERMITA LETERO

Estimataj gesamideanoj!

Ni jam pretigis (en provizora formo) la 1-an parton de „Esperanto en Rumanio” - periodo 1889-1960.

Ni sendis kopion de tiu manuskripto al 10 gesamideanoj por korektado kaj aldonoj.

Rezulte de tio ni ricevis

– de D-ro Marian CONSTANTINESCU (rilate al 1-a parto) tripaĝan leteron enhavante tre interesajn korektojn kaj aldonojn.

– de prof. D-ro Ignat Florian BOCIORT (rilate al la 2-a parto, t.e. post 1960) ni ricevis riĉan materialon pri la E-movado en Rumanio dum sia aktivado sur tiu kampo kaj same taŭgajn sugestojn.

En kunlaboro kun D-ro BOCIORT ni preparis DEMANDILON (CHESTIONAR), kiun ni sendis al esperantistoj en Rumanio (laŭ adresolisto farita de D-ro BOCIORT). Ni rericevis 21 komplektigitajn Demandilojn.

Dankegon al ĉiuj kiuj respondis. Krome ni petas vin, se vi mem verkis originalajn aŭ tradukajojn aŭ se vi konas pri verkoj de aliaj rumanaj esperantistoj, bonvolu sendi al ni la titolojn de tiuj verkoj, ĉar ni kolektas ilin por bibliografio.

En kia stato estas la afero nun?

La tuta materialo menciita supren troviĝas por konservado ĉe F.C.,G.H. kaj BAZARO (SIGMOND Julia). Konklude:

Ni, Florin CARAGEA kaj Gigi HARABAGIU, rakontis en la 1-a parto kion ni eksciis pri la pasinteco kaj ankaŭ same kion ni memoris pri la periodo kiam ni agis dum ni vivis en Rumanio (tio signifas ĝis 1960, kiam kun bedaŭro ni devis forlasi nian patrujon.)

Nun, por „Esperanto en Rumanio” la 2-a parto (tio signifas ek de 1960 - ĝisdate), estas via vico, vi, kiuj daŭre portas la flagon antaŭen rakonti pri viaj agoj kaj spertoj.

En preskaŭ ĉiuj rricevitaj demandiloj estas **bonegaj** ideoj nome: oni devas organizi E-kursojn, oni devas sendi ~~vortarojn, oni devas traduki kiel eble plej~~

informleterojn al la lokaj ĵurnaloj kaj radiostacioj, oni devas eldoni lernolibrojn kaj vortarojn, oni devas traduki kiel eble plej multe el verkaro de eminentaj rumanaj verkistoj, oni, oni, oni...

Permesu al ni, karaj gesamideanoj la demandon: Kiuj estas tiuj oni? Ĉu „oni” ne estas ni ĉiuj? Ĉu? Gekaraj, mobilizu ĉiujn viajn fortojn ne nur por tiuj kaj similaj agadoj, sed ankaŭ por varbi sciencistojn, universitanojn, verkistojn, kulturkreantojn, instruistojn ĉiugradajn, ĉar ili estas fortoj kaj efikoj **multiplikantoj** de la novaj ideoj en la moderna socio.

Kiam vi pretigos la 2-an parton de „Esperanto en Rumanio”, ni esperas ke troviĝos inter vi tiaj historiistoj, kiuj kapablos elĉerpi la plej interesajn partojn de tiu, de ni kolektitan materialon kaj verkon spertprofesie E-historion.

Tia verko estos utila por la nuna kaj estonta generacio kiel kuraĝilo por daŭre labori por **Esperanto** kaj ties idealo.

Vere indas labori entuziasme por nia lingvo.

„Ni semu kaj semu, neniam laciĝu,

Pri l`tempoj estontaj pensante.

Cent semoj perdiĝos, mil semoj perdiĝos,

Ni semu kaj semu konstante...”

Florin CARAGEA
Postfach 550 301
DE-60402 FRANKFURT/Main

Gigi HARABAGIU
837 Geary St., Apt.205
SAN FRANCISCO, USA
CA 94109

Korespondadreso en Rumanio: BAZARO, SIGMOND Julia,
3400 CLUJ-NAPOCA - 1.
C.P. 1111.

Pro la donacitaj libroj por la Pruntlibraro, la redakcio de BAZARO dankas al:

Andrzej KOLPANOWICZ, POLLANDO

Ionel ONET, USONO

Dr.Radu HORATIU, KLUĴO, RUMANIO

Anneke SCHOUTEN-BUYS, NEDERLANDO

Tre utila kaj interesa libro same por la Esperanto-parolantoj kiel por la rumanlingvaj lernantoj de ILo

ESPERANTO de Saul OSIAS

nun haveblas ĉe nia redakcio.

Sur la 242 paĝoj de tiu ĉi libro, inter interesaj opinioj pri nia lingvo ĝi entenas la Fundamenton de Esperanto, la Ekzercaron de ZAMENHOF kaj fundamentan vortaron Esperanta - Rumanan kaj Rumana - Esperantan.

Do vi ne perdu la okazon kaj rapide mendu ĝin remburse nur kontraŭ 25.000 leojn.

LA VIVO KAJ LA MORTO LAŬ LA KOSMOLOGIO DE MARTINUS

Ĝenerale estas akceptita pri la homa vivo, ke ĝi estiĝas en la patrina korpo kaj daŭras ekde naskiĝo ĝis la morto, de la lulilo ĝis la tombo. Sed tio estas nur kion ni povas sperti, laŭ la perspektivo de la unuopa surtera vivo. Niaj senskapabloj estas limigitaj de dimensioj de spaco kaj tempo. Tiu limigita sperto determinas same limigitan pensmanieron kaj sekve ni neniam povas fari analizon de la tuteco. Tio estas la kaŭzo, ke la vivo ne estas vidata, aŭ konsiderata kiel „eterna”, sed kiel „efemera”.

La nuntempa homaro suferas pro „kosma senkonscio” kaj tial ĝi konas nek sian eternan estintecon, nek sian eternan estontecon. Sed pro la fakto, ke ni ne memoras nian naskiĝon, ĉu oni povas nei ĝin? Se ni ne antaŭvidas la morgaŭan pluvon, ĉu do ne pluvos?

Laŭ naturleĝoj de cirkulado ĉiuj estas fenomenoj ripetiĝantaj per cirkulo. Kial la sama principo devus ĉesi efiki rilate al la homa vivo? Se ni asertus, ke la surtera homa vivo ne estas ripetado kadre de cirkulo, sed prezentas unuopan aferon, do en la naturo ni ne trovas iun ajn ekzemplon kiu konfirmas tian neripetadon. En la universo ĉio estas daŭre ŝanĝiĝanta, simile ĉiu unuopa estulo troviĝas eterne en ŝanĝiĝanta stadio, survoje al sia anstataŭiĝo de alia stadio, eĉ radia stato nevidebla. Ankaŭ la homa konscio trapasas diversajn stadiojn, akirante kosman konscion, kio ebligas travidi la tutan mistikon de la vivo.

SOFINETI Éva, BAIA MARE

LETERO AL BAZARO

Dank' al unu el miaj leteramikoj el Hungario, mi ricevis du ekzemplerojn de via revuo BAZARO. Ĉar ambaŭ estas tre interesaj kaj enhavoriĉaj, mi volonte konatiĝus kun nove eldonitaj.

Ĉi okaze mi gratulas al vi la rakonton pri „blanka koko”. Ĝi samtempe realisma kaj simbola, montras kiel gravaj estas en nia vivo ne nur uzvaloroj.

Mi sendas por via biblioteko du libretojn, eldonitaj antaŭ nelonge en Krakovo kaj kelkajn numerojn de nia tre modesta bulteno.

Kun plezuro mi kaj certe ankaŭ niaj geklubanoj kontaktiĝus kun esperantistoj el Kluĵo.

Andrzej KOLPANOWICZ
ul.Długa 8/44. PL-32065 KRZESZOWICE

ARANĜOJ

86-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

21-28 julio 2001, ZAGREBO, KROATIO

La aliĝkotoj en eŭro por Rumanianoj estas la jenaj:

Aliĝkategorio	ĝis 31.12.2000	ĝis 31.03.2001	poste
individua membro de UEA	90	112	135
ne individua membro de UEA	112	140	168
kunulo/junulo/handikapulo, mem individua membro de UEA	45	56	67
kunulo/junulo/handikapulo, ne individua membro de UEA	67	84	102

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperos en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.

Senpage aliĝas: -infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 31.12.1980;

-nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

.Aliĝu al: UEA, Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, NEDERLANDO.

PREĜO

Eugen JEBELEANU

Patro nia, kiu estas en la ĉielo
descendu, se ci estas, surteren
kaj haltigu la venton de l'morto
restigante vivaj la vivajn
kaj restu inter ni se ci estas al ni patro,
el sango fluanta farante vivon
kaj igu ĉiun armeon
civila akompanantaro.
Amen.

El la poemaro Hanibal' (1972) tradukis:

Mag. Nicoleta MENDREA

MARIA

Zaharia STANCU

Mi vin serĉas, Maria, mi vin serĉas,
En la ikonoj de l'Jerusalem' perdita,
En la ikonoj je jaroj forkonsumitaj
En la vango tranĉita de l' luno.

Mi vin serĉas, Maria, mi vin serĉas,
Apud la muroj senvortaj
Apud la arboj mutaj, multjaraj
Apud la ŝtonoj antikvaj de Magdalo.

El la poemaro Blankaj (originale: Albe, 1937) tradukis:

Mag. Nicoleta MENDREA.

ASOCIO de ESPERANTO
C.P. 1111
RO-3400 CLUJ-NAPOCA
RUMANIO

IMPRIMATE-PRESAJO



al

PAPP TIBOR
TROMBITÁS u.12.
H-4031 DEBRECEN
U N G A R I A